



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 7-a de Januaro 2019

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon, Gabi Zeevi.

*La Estraro esprimas siajn kondolencojn al nia amiko, estrarano, Asaf Ĥefec, pro la forpaso de lia fratino.*

*Protokolo de la antaŭa kunsido (3-a de Decembro 2018) – publikigita en la retejo.  
http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201812.*

### **1. Sciigoj**

- Amri partoprenis du E-renkontiĝojn en Germanio, prelegis pri la Israela Kongreso en Eilat, disdonis la informilon kaj varbis plurajn partoprenantojn.
- Nurit el Servas petis informojn pri E-o, ili volas konatiĝi kun E-o. Ŝi invitis Jehoŝua al ilia kunveno en marto, en Segev.

### **2. E-kursoj en Tel-Avivo** (Amri)

- Daŭriga kurso - finiĝos baldaŭ. Rezultoj?
  - Kurso por komencantoj de Eldad estas planita por 14/1, sed ĝis nun ne okazis reklamado. Konsentite lasi al Doron fini la daŭrigan kurson, kaj nur tiam komenci.
  - Anonco: kie? Galeria jam eluzita. Yediot? Haaretz? Israel Hayom? Ĉu Semajnfine? Ĉu la sama aŭ nova anonco? Unu colo kostas ĉ. 1750 (musaf) -2200 (novaĝpagoj) NIS.
- Decidoj:** Reklami en du gazetoj, en la venontaj semajnfinoj! Ili devas aperi almenaŭ unu semajnon antaŭe, indas iom pli. Estis prezentitaj du skicoj far' Amir.
- Voĉdono: aprobata unuanime*
- Kiu respondecas? Amri por Facebook, Amir kaj Amri por la anoncoj.
  - Ĉu prokrasti la kurson? Propono: la 4-an de februaro. Eldad konsentas prokrasti. Ni devas konsulti kun Doron por ne kolizii kun la daŭriga kurso.
  - Eldad preferas ĝis 10 personoj. Amri: por rekompenci la kroman laboron ni ofertu bonuson de ekz. 100 NIS, por ĉiu persono super 10. *Voĉdono: aprobata unuanime.*
  - Amir pretas denove telefone respondi, lia tel.numero estas 052-360-5716.

### **3. Oficejo** (Amri)

- Ŝlomo trovis oficejon kun salono apud Arlozorov, en turo Recital por 350 mil.
  - Amri trovis similan oficejon en turo WE (apud trajnstacio Ha-Ŝalom)
  - Amri renkontiĝis dufoje kun la agentoj kaj verkis komparajn dokumentojn, kiuj estis rete dissenditaj kaj diskutitaj inter la estraranoj (+Amir). Li proponas daŭrigi kun WE. La komence petita prezo estis 420 mil, post negocado inter la peranto kaj Amri ĝi malaltiĝis al 360 mil, eble ni povos ankoraŭ iom malaltiĝi.
- Voĉdono: Amri kaj Ŝlomo estas komisiitaj subskribi kun WE.*
- Advokato Modan estas en kontakto kun la advokato de WE
  - Propono de oficejo-teamo: Amir, Ŝlomo, Amri. *Voĉdono: aprobata unuanime*

2/...



#### 4. Financoj (Ŝlomo) -

- a) Estis disdonita la buĝeto por 2019. *Okazis diskuto.*
- b) Rekompenco por Doron por la daŭriga kurso: estis decidita antaŭe, 3500 NIS
- c) Amri: la defcito pro la 20-a IK espereble estos malpli granda ol pasintjare, ĉar estos pli da eksterlandanoj, kaj la programkotizo estas pli alta.

#### 5. Israela E-isto (Mikaelo - ne venis kaj ne respondis telefone)

- a) N-ro 166 estis presita (250 ekz) kaj disdonita dum la ZV kaj en la klubo. Amri notis la ricevintojn.
- b) Necesas enkovertigi kaj dissendi. Ĉu Mikaelo povas surprizi tiujn taskojn? Kovertoj? Jehoŝua: kaze de represo de kovertoj, ni devas renovigi iliajn datumojn. Etikedoj? Jehoŝua promesis ĝisdatigi la adresaron, Dror klopodos printi la etikedojn, kaj ni provu venontmonate en la klubo organizi la enkovertigon.

#### 6. IK-20 Eilat+Akaba (Amri)

- a) La prezoj de la hotelo en Eilat malaltiĝis: nur 450 NIS por 3 noktoj. Notite por la rezervitaj ĉambroj. Tag- kaj vespermanĝojn ni organizos ekstere, en apudaj restoracioj
- b) Dror kreis retan aliĝilon por israelanoj. Aliĝintoj ĝis nun: 15 israelanoj, 7 eksterlandanoj.
- c) Venis propono de Sasa Pilipovic kaj Georgo Handzlik veni al Eilat iliakoste, nur la loĝigon ili petas. Temas pri nur 1160 NIS por ambaŭ, kaj ili estas bonega teatra teamo.  
*Voĉdono: jes, unuanime*
- ĉ). Transportado - Eged-buso el TA, kaj aparta de Haifa, flugo, privataj aŭtoj. Jehoŝua: ni organizu karavanon el Beer Ŝeva (ĝis tie per trajno).
- d) Gabi: necesas klare informi pri la kondiĉoj en Club Inn: du dormĉambroj kun *komunaj* banejo kaj kuirejeto; Vizo-kondiĉoj: oni devas resti *du noktojn* en Jordanio por eviti la 60\$-an vizokoston;
- e) Amri: estos tre riĉa programo – tage: ekskursoj al Timna, Subakva Muzeo, eble Ruĝa Kanjono; vespere: kvin eksterlandaj artistoj.  
[posta ĝisdatigo de Amri: ĝis 9.1.2019 estas ĉ. 30 aliĝitoj, inter ili 10 eksterlandanoj. Interkonsente kun Renato Corsetti, la MONA-kunveno en Akaba okazos nur 14-15.4, post la IK en Eilat].

#### 7. UEA kotizŝanĝo (Jehoŝua)

- a) Jehoŝua intencas telefoni al ĉiuj IM-j kaj demandi, ĉu ili volas remembrigi.
- b) Sekve - protesta letero estos sendita al la Komitato pri la rezulto de la kotizreformo por la israela IM-aro (granda falo).



c) La datumoj por 2018: ĉ. 70 IM, 34 delegitecoj, 24 delegitoj, 8 DM. Kiom restos en 2019? Ĝis nun nur du rekotizis por UEA, ĉar malaperis la ebleco MJ. Nun membreco en la baza kategorio kostas 190 NIS, anstataŭ 80 NIS.

ĉ) En Germanio Amri renkontiĝis kun Martin Shaffer, kaj reage al la plendo de ELI pri la kotizaltigo, li proponis duon-“kanutigi” (pagi 50% de la baza kotizo) ĉ. 5 israelajn s-anojn por la kuranta jaro.

### **8. Dratverejo** (Jehoŝua)

a) Amos finis la ordigon de la pagoj: 6000 NIS kontante, la cetero per ĉekoj. Ili devos repagi la lokan imposton (arnona), ĉar ELI pagis ĝis 31/12, kiam ili parte jam enloĝis.

b) Rekompenco por Amos. Propono: Amos plenigos vojaĝ-formularon, li mem decidu pri la km-oj.

### **9. Jerusalema Libro-Foiro 2019** (Amri)

Ankoraŭ ne estas precizaj datoj (en Aŭgusto?). Ĉu mendi budon?

*Voĉdono: Jes, unuanime.*

**La venonta kunsido:** 4-a de Februaro 2019, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi / Amri Wandel